
# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (944) • 2020 •

DIA REGNO
ISSN 0167-9554



Pentanta Maria Magdalena de Artemisia Gentileschi (1593–1653)



Fra Bartolomeo: ”Noli me tangere”, [Ne tuŝu min] ĉ. 1506



Ĉe la kruco, Majstro of Hoogstraeten (ĉ. 1475–ĉ. 1530)



Ticiano: ”Noli me tangere”, ĉ. 1512



Bizanca ikono pri ŝi, kiel mirha portanto (14a ĝis 17a jc)



Maria Magdalena ĉe la kruco, Jules Joseph Lefebvre (1836–1911)

## Maria Magdalena en pentroarto

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Sankta Spirito | 99 |
| Hereza Evangelio | 101 |
| La Evangelio laŭ Maria Magdalena | 106 |
| Kial ni afrikanoj fidas al Dio? | 110 |
| Modernaj komunikiloj — ŝanco por KELI | 113 |
| Klimato: Ĉu estas sane nenion fari? | 115 |
| Ni ne forgesu | 117 |
| Iom gramatike – el PMEG | 118 |
| Informetoj – retaj ligiloj | 119 |
| Nek la morto, nek la vivo | 120 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, denove la pandemio furiozas ĉirkaŭ ni. Neniu kaj nenio estas ekster ĝia influo kaj ni devas en nia ĉiu-taga vivo adaptiĝi, eble eĉ por longa tempo estonta, al limigaj ordonoj de niaj gvidantoj. Ni ne povas bone antaŭvidi la personajn kaj sociajn sekvojn de tiu pandemio.

Unu formo de adaptiĝo estas la uzo de interretaj komunikiloj. Ĉiuj provas diversmaniere refari kunvenojn al virtualajn renkontiĝojn anstataŭ nuligi ilin. Tio fakte ebligas al ni partopreni kunvenojn, kiuj normale estus tro foraj. Legu ekzemple la ĉi-numeran artikolon de Wolfram Rohloff pri tio.

La pandemio ankaŭ influis la ĝustatempan aperon de Dia Regno. Sed ni daŭre planas ke la sesa numero aperos ĉijare, plej laste mallonge post la kristnasko. Do, jam nun:

*Redaktoro kaj distribuanto/sekretario deziras al vi benatan kristnaskofeston!*

# Sankta Spirito

Prediko dum la internacia reta diservo en majo 2020

Václav Pospíšil, CZ

Karaj gefratoj! Vi ĉiuj certe konas, kiel la sankta Luko en la Agoj de la apostoloj sciigas pri la alveno de la Sankta Spirito. Mi tralegos la vortojn de apostolo Petro, lian citaĵon de la profeto Joel:

> *Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon. Kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos. Kaj viaj junuloj havos viziojn. Kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn. Kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton. Kaj ili profetos. Kaj mi donos miraklojn en la ĉielo supre, kaj la signojn sur la tero malsupre: sangon, fajron, kaj vaporon de fumo; la suno fariĝos malluma, kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ ol venos la granda kaj majesta tago de la Eternulo. Kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos.*

Apostolo Petro eksplikas vortojn de la profeto Joel. Ĉiu, kiu fariĝos per la pento kaj la baptiĝo disĉiplo de Jesuo, akceptos la donacon de la Sankta Spirito. La Sankta Spirito estas ĉi tie en la mondo. Se ni diras, kantas, Venu Sankta Spirito, ni ne elvokas lin el la ĉielo. Li estas ĉi tie, kaj ni preĝas, ke li agu, faru. Ni bezonas ŝanĝi nian koron, nian pensmanieron, vekiĝi el dormemo. La Sankta Spirito estas ĉi tie, ĉar la mondo jam ne plu apartenas al la diablo. Jesuo Kristo estas ĝia Reĝo. Li ja diris: *Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero*. Do lia Regno, kiun li alportis el la ĉielo estas ĉi tie kaj ni estas ĝiaj loĝantoj. Eĉ se ŝajnas, ke la mallumo, la malbono venkas.

Kiel ni kondutu kiel civitanoj de Dia regno? Kelkaj kristanoj atendas la duan alvenon de Jesuo. Ili elnombras la sig-

15 Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. 16 Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam; 17 tiu estas la Spirito de la vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne vidas nek konas; vi lin konas, ĉar li restadas kun vi kaj estos en vi. 18 Mi ne lasos vin orfaj; mi venas al vi. 19 Ankoraŭ iom da tempo, kaj la mondo ne plu vidos min, sed vi vidos min; ĉar mi vivas, tial vi ankaŭ vivos.

23 b Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. 24 Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis. 25 Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. 26 Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi. 27 Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.

Johano 14, 15-19 kaj 23b-27

nojn de lia alveno. Ili esperas ke Kristo venos kaj alportos ilin en la ĉielon. Kiam Jesuo foriris en la ĉielon, disĉiploj ankaŭ staris kaj rigardis ĉielen. Du viroj blanke vestitaj, du anĝeloj, diris al ili: *Viroj Galileanoj, kial vi staras rigardantaj al la ĉielo? Ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon.* Kion faris la apostoloj? Post la alveno kaj akcepto de la Sankta Spirito ili komencis praktikan vivon en la Dia regno. Ili disvastigis la evangelion de Jesuo, fondis la unuan komunumon kaj prizorgis, por ke neniu suferu necesbezonojn. Ankaŭ apostolo Paŭlo fondas kaj plifortigas eklezionjn en diversaj partoj de la Romia regno. Dia regno kaj regado de Jesuo Kristo jam estas en nia mondo, sur la tero. La malamiko povas damaĝi ĝin, tamen ne povas venki. Ni vivas en la lasta tempo kiu celas al la tago de la Eternulo. Sed ĉu estas ĉio farita por ke Jesuo povu alveni? Tute ne. Per nia vivo, per niaj bonaj agoj ni atendas kaj akcelas la alvenon de la tago de Dio. Tiel atestas apostolo Petro. En tiu tago venos Jesuo juĝi la mondon. Ankaŭ niajn farojn. Dia juĝo ĉiam signifas alvenon de la justeco kaj renovigon de la mondo. La sankta urbo Jerusalem malsupren iros el la ĉielo. Fine kuniĝos la ĉielo kaj la tero, kaj niaj korpoj, post la glora resurekto de Jesuo, ankaŭ estos revivigitaj, kaj ni vivos kaj regnos kun Jesuo sur la nova tero. Laŭ niaj agoj. Dio preparas por ni bonajn agojn, li preparis sian Regnon sur la tero, kaj ni ĝin devas plenumi.

Ĉio trairos tra la fajro, avertas nin la Sankta Skribo. Ankaŭ apostolo Paŭlo: *Neniu povas meti alian fundamenton krom tiu, kiu estas metita, tio estas Jesuo Kristo. Sed se iu konstruas sur la fundamento oron, arĝenton, multekostajn ŝtonojn, lignon, fojnon, pajlon, ĉies laboraĵo evidentiĝos; ĉar la tago ĝin montros, pro tio, ke ĝi estas malkaŝita en fajro; kaj la fajro mem provos ĉies laboraĵon, kia ĝi estas. Se restos ies laboraĵo, kiun li surkonstruis, li ricevos rekompencon. Se ies laboraĵo forbrulos, li suferos perdon; sed li mem saviĝos; tamen kiel tra fajro*.

**Per nia vivo, per niaj bonaj agoj ni atendas kaj akcelas la alvenon de la tago de Dio.**

Ni ĝoje atendas alvenon de nia reviviĝinta Sinjoro. Ĝoje ni ankaŭ atendas nian reviviĝon. Do ni lasu la Sanktan Spiriton plenumi nian koron kaj nian menson. Ni lasu agi lin en ni kaj pere de ni. Por ke ni konstruu bone. Por ke ni povu ekvidi en la nova tero ankaŭ ĉion, kion ni faris por ĝi, por la bona vivo en nia planedo, por la homoj, bestoj, plantoj, mallonge dirite: por la Dia regno, kiun al ni alportis Jesuo, kaj en kiun li revenos kaj ĝin reformos.

Vidu la diservon ĉe:
https://tinyurl.com/reta-diservo-majo2020

# Hereza Evangelio

Prelegserio de József Farkas, hungara
reformita pastoro, aŭtune 1969

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Moto:

> Laŭ liaj samtempuloj Jesuo estis herezulo, nur poste lia instruo fariĝis evangelio. Kiam Luther komencis prediki la nove ekkomprenitan evangelion, oni akuzis lin pri herezo, nur poste lia scio fariĝis reformatora pravo. Kiu kuraĝas hodiaŭ prediki tiun herezan evangelion, kiu morgaŭ fariĝos ĉiutaga pano al kristanoj?

## Vualo kovras nian koron

> *Ĉar tian esperon ni havas, ni do plene sentime agadas, malsimile ol Moseo, kiu pervuale kovris sian vizaĝon, por ke la Izraelidoj ne rimarku la finon de lia pasema gloro. Sed iliaj pensoj duriĝis. Ĉar ĝis la hodiaŭa tago kuŝas la sama vualo super ilia legado de l' malnova interligo. Ĝi ne forpeniĝas, ĉar nur en Mesio ĝi malaperos. Ĝis hodiaŭ kuŝas vualo super ilia koro, ĉiufoje kiam Moseo estas legata. Sed ĉiufoje kiam iu sin turnas al la Sinjoro, la vualo formetiĝas. Nu, 'la Sinjoro' <ĉi tie> estas la Spirito; kaj kie estas la Spirito de l' Sinjoro, tie estas libereco. Ni ĉiuj, kiuj kun nevualita vizaĝo spektas la gloron de l' Sinjoro, ni transformiĝas en ĉiam pli gloran imagon de Li, dank' al la Spirito de Dio.*
>
> Dua letero al Korintanoj, 3,12-18 (laŭ la traduko de Gerrit Berveling)

Antaŭ tri mil jaroj vivis en Ĉinio filozofo-poeto, laŭnome Ĉuang Ce. Unu matenon vekiĝante el sia sonĝo, li tiel pensadis: Nokte mi sonĝis, ke mi estas papilio. Nun mi kiel sciu: ĉu mi estas homo, kiu nur nokte sonĝis ke mi estas papilio, aŭ inverse: mi estas papilio, kiu nun sonĝas, ke mi estas homo. Ŝajnas ludanta, surfaca filozofado tiu ĉi pensado, sed mi povas diri al vi, ke devis pasi trimil jaroj, ke la scienco atingu la pensadon de Ĉuang Ce. Tiu ĉi ĉina filozofo serĉis la veron. Kiu mi estas? Mi memoras, ke mi sonĝis, ke mi estas papilio. Sed eblas, ke iam malkovriĝos, ke kiel papilio mi sonĝis, ke mi estas homo. Kio estas la vero?

Post trimil jaroj la scienco atingis tiun ĉi problemon kaj la psikologio komencis pensadi pri tio: diru, kion vi sonĝis kaj mi diros, kiu vi estas. Psikologoj eltrovis, ke dum la libereco de la nokta ripozo aperas nia vereco, multe pli ol en la dumtaga vualiĝo, en la dumtaga kiraso. Dumtage ni kovras nin per vualoj, pri kiuj poste ankaŭ ni pensas serioze, kaj je la fino ni jam ne scias, kiuj ni estas. Sed en la

malstreĉo de la nokto faliĝas la vualo, faliĝas la kiraso kaj aperas la realo, en la sonĝo aperas la vero.

Kaj ni alvenis al nia nuna temo, al la demando de la realo. Kiu mi estas? Kiaj homoj estas ĉirkaŭ mi? Kio estas la mondo? Ĉu estas Iu en tiu ĉi mondo, aŭ malantaŭ de tiu ĉi mondo? Tiu Iu, kiun ni kutimas nomi Dio? Kio estas la realo? Al tiuj demandoj respondas la cititaj versikloj, en kiuj apostolo Paŭlo diskutas kun la judoj, kun la jud-devenaj kristanoj, kiuj tiriĝis reen al la leĝo. Paŭlo tiel diskutas, ke li diras siajn personajn spertojn, metite ilin en filozofiajn tezojn. Ni konas la historion de Paŭlo, li kuris al Damasko, blinde pro la malamo li persekutis la kristanojn. Kaj tie, sur la vojo al Damasko aperis al li Jesuo. Tiel li priskribas sian travivaĵon, ke „tuj falis de liaj okuloj kvazaŭ skvamoj, kaj li ree povis vidi (Agoj de apostoloj 9:18). Reenpensante li realizis, kiel blinda li estis. En Kristo li renkontiĝis kun la realo. Tiu ĉi travivaĵo estas malantaŭ la citita versiklo. Tion diras Paŭlo, ke la judoj legas, esploras Moseon, sed vualoj kovras iliajn korojn, kaj pro la vualo ili ne vidas, ne komprenas la veron. La vualo ĝis tiam estos sur iliaj koroj, ĝis kiam ili alvenos al Kristo. La oferdono, la preĝo, la psalm-kantado, ĉiuj estas vanaj, ĉar vualo estas sur ilia vizaĝo, sur ilia koro ĝis kiam ili renkontas Kriston. Kiam ili alvenas, okazas iu miraklo: faliĝas la vualo, malfermiĝas iliaj okuloj, ili renkontiĝas kun la realo, komprenas la skribaĵojn, komprenas la historion, komprenas ilian propran situacion, kaj neatendite ili estas en la lumo de la realo. En la 6a versiklo de la 4a parto Paŭlo parolas pri tiu ĉi travivaĵo, kiel la kreado: „La sama Dio kiu diris: El la mallumo brilos lumo, lumigis en nia koro por briligi la scion de l' gloro de Dio…"

Kiel nebula, malcerta, kaosa estis ĉiuj je la komenco de la mondo, ĝis kiam Dio kreis lumon, same en nia koro estas kaoso ĝis kiam Dio kreas tie lumon. Ekde tiam ni komprenas la mondon kaj nian lokon en la mondo. Ne la eksterajn aĵojn oni devas pli kaj pli bone lumigi, meti sub mikroskopon – en ni mem bezonas krei novan mondon, krei lumon. Per kiu ajn lumo ni povas lumigi la realon, se interne estas mallumo, ni komprenas nenion.

Kion mi ĝis nun diris, estas la diskuto de Paŭlo kun la judoj kaj la jud-devenaj kristanoj. Sed mi kuraĝe vastigas tiun ĉi diskuton, kaj diras, ke kion Paŭlo tie ĉi diras, estas vera pri ĉiuj homoj, pri ĉiuj serĉadoj pri la vero. Estas vualo sur la koro de la homoj: diversaj antaŭjuĝoj, pretendoj, timoj, mitoj, dogmoj, sociaj kutimoj, fiksitaj konvencioj. Tiuj ĉiuj estas vualoj, kiuj malebligas, ke homo vidu la realon. Kaj estas prava la travivaĵo de la apostolo, ke tiuj ĉi vualoj ne faliĝas, ĝis la animo ne alvenas al Jesuo. Paŭlo uzas tiujn vortojn: Sankta Spirito, libereco. Kie estas la spirito de Dio, tie estas la libereco. La Spirito de Jesuo Kristo estas la dia potenco, kiu forprenas la vualon. Tiu ĉi estas nia nuna temo, tiun ni devas praktiki: renkontiĝi kun la realo, ke poste ekfajriĝu nia koro por la peto: Venu, Spirito de Jesuo Kristo, forprenu de mi la vualon, pro kiu mi nur blinde povas iri en la mondo. Mi ne komprenas min mem, nek la alian homon, nek la mondon.

Mi diras kelkajn problemojn, kaj tion, kio estas la respondo al la sama demando – malantaŭ la vualo kaj sen vualo.

La unua demando: en kiu estas enigitaj la aĵoj? Mi, mia vivo estas enigita en io. Mia familio, mia hejmlando, la

terglobo. Kiu estas malantaŭ ĉio, en kiu la aĵoj estas enigitaj? La moderna filozofio respondas: en la Nenio estas enigita la Io. La Nenio estas la fono, en kiu ekzistas ĉiuj ekzistantoj. Kaj tiu ne estas nur teoria filozofio. La moderna homo perdis sian fidon en Dio kaj travivas la nihilon.

Kontraŭe ni – se la indulgo forigis la vualon de nia vizaĝo – feliĉe kredas, ke enigite en Dia amo ekzistas ĉiuj ekzistantoj. Kaj se tion travivas la homo, malaperas la timo de la animo, ke mi ekzistas en la Nenio. Subite la homo havas okulon vidi la belecojn kaj ĝojon vivi la vivon. La mondo ekzistas enigite en la Dia amo.

Kaj niaj pekoj? En kiu niaj pekoj estas enigitaj? Ĉiuj religioj respondas: la pekoj estas enigitaj en la kolero de Dio. Dio baras sian koleron, sed iam finas Lia pacienco kaj tiam la homo ricevos sian punon. Mi kuraĝe kredas, ke ankaŭ niaj pekoj estas enigiitaj en la amo de Dio. Kiam mi diras tiun „herezan" penson, mi sentas malantaŭ mi Jesuon. Li diris, ke Dio amas nin ankaŭ kiam ni pekas, amas, amas, ĝis kiam ni ekhontas nin. Kaj poste vere okazas io.

La dua moderna demando estas la forto: kiaj fortoj estas en la homa mondo, socio, historio? La saĝa homo respondas: la forto de la genia frenezeco laboras en la homa historio. Bezonis genieco inventi la dinamiton, ekkompreni la sekretojn de la atomoj, vojaĝi en la spacon. Sed la genieco servas la murdadon, la frenezecon. Ni gratulas al la astronaŭtoj, sed ĉiu scias, ke plejparte militaj celoj urĝigas tiujn esplorojn. Kaj la genia frenezeco pliiĝas: des pli genia estas la homo, ju pli timiga estas la frenezeco, kiun la genieco servas.

Sed tiu estas la fina realo? Ne! Se ni ricevas pli plenan vidon en Kristo, ni scias, ke ankaŭ la fortoj de la Sankta Spirito ekzistas en tiu ĉi mondo! Tiuj estas silentaj, mildaj, sed ne senfortaj! Tiuj laboradas en la patrinoj, en la poetoj, en la muzikistoj aŭ en la doktoroj. Sanktaj Spiritaj fortoj, kiuj radias en nian mondon la vivon, la paciĝon, la amon. La fortoj de la genia frenezeco estas laŭdaj, spektaklaj, rimarkindaj – la fortoj de la Sankta Spirito silente funkcias. Kredi signifas esti certa, ke tiuj silentaj fortoj venkos en la homa historio. Ni atendas novan ĉielon, novan teron, novan homaron, kaj nia atendado baziĝas sur tio, ke ankaŭ la fortoj de la Sankta Spirito estas en nia mondo – miskompreneblaj, atakeblaj, sed nevenkeblaj.

Mi ĵetas ankaŭ trian problemon: kiu estas la homo fine? Kiu estas tiu sekretplena estaĵo, kiu atentas la mondon, kiu akceptas kaj transdonas tiujn fortojn, suferas pro ili kaj sumigas ilin en si mem? Kiu estas la homo, kiu pensadas pri tiuj aĵoj? Ĉu la homo estas besto, kiu ne rajtas realigi sin mem, ĉar la socio baras lin? Aŭ la homo estas spirita estaĵo, kiu ne povas realigi sin mem? Grandioza estas la diferenco inter la du respondoj kaj bedaŭrinde ĝenerale la respondo estas, ke la homo estas besto, kiu ne rajtas realigi sin mem. Sed ni per malfermitaj okuloj fare de Kristo kredas, ke la homo estas enkorpigita spirita estaĵo, kiu ne povas realigi sin mem, kaj kiu devus esplori ĉu estas ie helpo, ke tiu spirita estaĵo povu realigi sian homan vivon.

Tiel batalas unu kun la alia la du "tipoj" de vidado: la kun-vuala vidado kaj la sen-vuala vidado. Se iu trovas la vojon al Dio, la vualo faliĝas kaj subite la homo tute alie vidas la aĵojn.

Sed ekkoni la veron ne estas nur malfacile, ofte estas ankaŭ tre malagrable. Pro tio kutime ni ne volas ekkoni la veron. Ni ne ŝatas la veron, ĉar sen-

maskigas, hontigas, humiligas. Ankaŭ konsolas, sed unue humiligas, kaj tion homoj ne ŝatas. Tute honeste ni devas diri ankaŭ tion, ke ankaŭ la eklezio ne ŝatas la malagrablan veron, ne nur la ne-eklezio. Per mil kaj mil ekzemploj mi povus pruvi tion. La realo, la vero ne nur pro tio estas peza, ĉar malfacile eblas trovi ĝin, sed ankaŭ pro tio, ke estas peze elteni ĝin, kaj pro tio la homoj ne multe serĉas ĝin.

Du pensojn mi ankoraŭ diras pri la ekkono.

En la unua letero al la Korintanoj, en la 13a ĉapitro tiun strangan frazon ni trovas (12): "Nun mi ankoraŭ spektas kvazaŭ enspegule, en enigmoj, sed baldaŭ ni vidos plenvizaĝe. Nun mi konas nur parte, sed baldaŭ plene mi konos, kiel mi ankaŭ estas konata." Per tiu ĉi lasta frazo mi ŝatus nun okupiĝi. Tion diras Paŭlo: Tiam mi tiel konos, kiel mi estos konata. Unue estas aktiva formo: mi konos, poste sekvas pasiva formo: mi estos konata, oni konos min. Kiam Dio konos min kaj Li diros al mi, kion li scias pri mi, tiam mi kapablos vere koni la aĵojn. En la homo estas tiu deziro: ekkoni la aĵojn. Estas granda aktivado: rapidegi, mezuri, teleskopoj, mikroskopoj. Mi estas aktiva, mi volas ekkoni la realon. Paŭlo diras pri tio, ke unue bezonas la pasiva kono, kaj poste komenciĝu la vera aktiva kono. Unue Dio devas ekzameni min kaj diri al mi kion li eksciis pri mi, kaj poste mi komencos ekkoni la aĵojn. Unue Iu devas ekkoni min, diri al mi, kion li scias pri mi, kaj poste miaj okuloj malfermiĝos al la kono. Paŭlo diras tion pri la finaj tempoj kaj vere, tiam pleniĝos la procezo. Sed mi aŭdace diras, ke tiu ĉi vero jam tie ĉi, hodiaŭ vespere estas valida. Kaj baze signifas, ke bezonas havi bonan amikon. Je tiu punkto denove multaj homoj faliĝas, ĉar tiu ĉi estas malagrabla vojo ekkoni la veron, sed se mi volas renkontiĝi kun la realo, unue mi devas renkontiĝi kun homo kiu havas malfermitajn okulojn, kiu konas min kaj diras sian opinion. Ĉio, kio sekvas, decidiĝas ĉi-tie: ĉu mi ofendiĝas, rifuzas kaj kroĉigas min al miaj iluzioj pri mi mem? Tiam estas vane daŭrigi la aferon. Aŭ mi povas akcepti, dirante: mi dankas, mia frato, ke vi diras tion. Estas dolorige, amare, mi ne tiel pensis. Se la homo povas akcepti, kion lia bona amiko diris, tiam komenciĝos la ekkono de la realo.

Kiun Paŭlo antaŭ dumil jaroj diris, nun ankaŭ la moderna psikologio diras, ke en interpersonaj rilatoj, en interakcioj puriĝas la homa vivo, la homa personeco, la ekkono, ktp. Tiuj ĉiuj povas ekflori nur dum renkontiĝo kun alia homo. Sed jam Paŭlo diris, ke la glora pleniĝo de tiu ĉi procezo estas, kiam Dio diras al mi, kiu mi estas. Tiam mi komencos vere kompreni, ekkoni. En la proksimeco de Jesuo tiun ni povas "gustumi" en nia surtera vivo.

Paŭlo tion diras, ke en Kristo faliĝos la vualo. Kion signifas tio? Mi nun per vere tre simpla, preskaŭ infana esprimo diras: ni akceptu, ke la vero ludas kun ni kaŝludon. Ni devas akcepti, ke la vero ne estas sur la surfaco de la aĵoj – la vero ja kovras sin. Ludas kun ni la vero, kaj ni devas lerni bone ludi la kaŝludon. Al mi estas tre mirinde, tio en Jesuo. Estis la long-barbaj ĉefpastroj kaj en la nomo de Dio ili diris la "veron". Kaj venis la ĉarpentista fraŭlo, kiu ne invokis gravulojn, sed diris: … tio kaj tio estis dirita al la antaŭuloj, sed mi diras al vi tion kaj tion… Aŭ simple invokis pri tio, ke vi de vi mem scias la veron (Luko, 12:56-57). Ĉu vi sentas la kaŝludon? Tiu ĉarpentista fraŭlo pravis, malantaŭ kiu neniu aŭtori-

tato estis – kaj ne tiuj ĉefpastroj pravis, kiuj referencis al Dio, Moseo kaj al pluraj aŭtoritatoj. En Jesuo la vero ludis kaŝludon. En la malforto oni devis malkovri la forton. En la needukita ĉarpentisto oni devis malkovri la filon de Dio. Kia kaŝludo!

Ĉiuj veroj tiaj estas. En la morto oni devas malkovri la vivon. En la malgranda strateto oni devas ekaŭdi la evangelion, kiun eble je la marmora predikejo homo vane serĉas. Nek la decaj tradicioj, nek la laŭtaj revolucioj garantias la veron. Dio metis la nazaretan Jesuon en tiun ĉi mondon, por ke homoj povu arogante, malmodeste preteriri Lin, kaj eble trovi en Li la finan veron. Tiel mi komprenas, ke en Jesuo faliĝas la vualo. Kiu praktikas en Kristo, tiu rimarku en la malgrando la grandon, en la preterĵetita afero rimarku la triumfan aferon de la futuro – ties spirita percepto pli kaj pli akriĝas, kaj rimarkos la kovritan veron.

Nuntempe oni festas la 60an datrevenon de la morto de Cézanne. Tiu ĉi mirakla homo, la patro de la moderna pentraĵo, kies bildoj valoras milionojn hodiaŭ. Ĉu vi scias, ke kiam li aliĝis al la belarta altlernejo en Parizo, la instruistoj ne akceptis lin, ĉar trovis, ke li estas sentalenta. Aliĝis duafoje, triafoje, sed ili ne akceptis lin, fine sen la altlerneja studado li fariĝis grandioza pentristo. Tiuj profesoroj estus devinta havi okulojn kaj rimarki la genion, sed ili ne havis okulojn, ili havis vualon sur ilia vizaĝo. Kaj kiam faliĝas la vualo? Tiun potencon, kiu helpas al ni en la kaŝludo trovi la veron, tiun la Biblio nomas Sankta Spirito.

Ankaŭ ĉifoje mi diras mallongan rakonton, en kiu vi bone sentos kion mi pensas. Kiam Rilke vivis en Parizo, li havis francan amikinon kun kiu li ĉiutage promenis en la samaj vojoj. Ĉe la enirejo de parko ili ĉiutage vidis almozulinon, kaj la junulino ĉiutage donis al ŝi moneron, kiun la virino apatie akceptis, eĉ ne dankis. La knabino demandis Rilke, kial li nenion donas al la virino. La poeto respondis: ne al ŝiaj manoj, sed al ŝia koro oni devus doni ion. Post kelkaj tagoj li aĉetis belegan rozon kaj kiam ili alvenis al la parko, li donis ĝin al la petantino. La virino rigidiĝis, ekstaris kaj forkuris. Dum la sekvontaj ses tagoj ili ne vidis la almozulinon, sed en la sepa tago ili trovis ŝin denove en ŝia kutima loko. Tiam la junulino demandis Rilke: de kio tiu ĉi virino vivis dum ses tagoj? Kaj la poeto respondis: de sia rozo. Sed poste velkis la floro kaj ŝi reeniris almozpeti.

Rilke sciis ion pri la sekreto de homo.

Pensadu iom pri la sekvontaj tri pensoj:

Liberigu vian spiriton de la kateno de antaŭjuĝoj, timoj, dogmoj, kutimoj. Kuraĝu diri la vorton: eble! Eble mi ne konas nek Dion, nek la aliajn homojn, nek min mem. Mi vidis la veron nur sur la surfaco de la aĵoj, mi neniam klopodis trovi la kovritan, kaŝludantan veron. Helpu, mia Dio, al mi ekkoni la veron!

Ektimiga kaj belega estas la penso: kiu jam vere konas min, tiu povas helpi min ekkoni la veron. Se vere estas tiel, tiam venu Jesuo, venu al mi en homa frato, ekkonu min, helpu ke mi ekkonu min mem kaj poste konigu al mi la realon!

Dum la problemoj de mia vivo ankaŭ mi vidu tion, ke ĉirkaŭ mi hom-bestoj batalas unu kun la alia en la malvarma malpleno. Jesuo, faligu la vualon de mia koro, de miaj okuloj, por ke mi vidu kaj komprenu, ke am-soifaj homoj vivas ĉirkaŭ mi. Faru min ilo de via resaniga amo!

# La Evangelio laŭ Maria [Magdalena]

– tradukita el traduko el la Kopta –

Gerrit Berveling, NL

La enkonduko troviĝas en Dia Regno 4/2020

> *(Oni prezentu al si, eklegante tiun ĉi tekston, ke okazas interparolo inter la Resurektinta Kristo kaj aro da gedisĉiploj.)*

[… ] La materio, ĉu neniiĝos aŭ ne?

La Savinto diris: Ĉio en la naturo, ĉiuj formoj kaj kreaĵoj ekzistas en kaj per kaj kun la ceteraj kaj ĝis siaj propraj radikoj ili ree dissolviĝos. Ĉar la esenco de la materio dissolviĝas je ties [origina] propra esenco. Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!

Petro diris al li: Tion ĉi klariginte, vi ankaŭ jenon ankoraŭ rakontu: kio estas la peko de la mondo?

La Savinto diris: Peko ne ekzistas. Sed vi estas la pekofarantoj, nome se agojn vi faras, kiuj esence estas identaj je tiu adulto, kiun oni nomas 'peko'. Tial venis la Bona en vian mezon, irante al la esencaĵo de ĉiu fenomeno, por ripari ĝin en ĝia radiko. Plue li diris: La kaŭzo, kial malsaniĝas vi kaj mortas, estas, ke vi [amas] tion kio […] Kiu povas kompreni, tiu komprenu!

Senegala pasio estas generita de la materio, ĉar ĝi estiĝis je maniero kontraŭnatura. De post tiam ekzistas konfuzo en la tuta korpo. Tial mi diris al vi: Kuraĝon do! Kaj, se foje vi senkuraĝiĝas, tiam tamen kuraĝu konfronte la multajn aperaĵojn de la naturo. Kiu orelojn havas por aŭdi, tiu aŭdu!

Post kiam la Benata diris ĉi tion, li salutis ilin ĉiujn per ĉi paroloj: Paco estu kun vi. Ricevu la pacon kaj atentu, ke neniu mistifiku vin dirante: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie. Ĉar la Filo de Homo troviĝas en via interno. Tiun vi sekvu! Kiuj lin serĉas, tiuj lin trovos. Foriru vi kaj prediku ĉi evangelion de la Reĝeco. Neniun alian ordonon vi ordonu krom tio, kion mi ordonis al vi. Kaj neniun leĝon vi proklamu, kiel faras la leĝodonanto, por ke vi ne iĝu ties kaptitoj.

Tion dirinte, li foriris.

Sed ili estis tristaj kaj ekploregis kaj ili diris: Kiel ni do iru al la <paganaj> popoloj por prediki la Reĝecon de la Filo de Homo? Se lin oni ne indulgis, kiel oni do indulgos nin?

Tiam ekpaŝis Maria en la mezon kaj ŝi salutis ilin ĉiujn kaj ŝi diris al la fratoj: Ne ploru, ne estu tristaj, ne dubu, ĉar lia graco estos ĉe vi plene por ŝirmi vin.

Prefere ni laŭdu lian grandecon, ĉar li formis nin kaj faris nin homoj. Per ĉi vortoj Maria turnis ilian koron al la Bona kaj ili komencis parole pri la paroloj de [la Savinto].

*(Tiam Petro invitas Marian Magdalenan, ke ŝi rakontu, kion ŝi ricevis kiel personan 'scion' pri Jesuo. Unu vizion ŝi rakontas do kaj – tre moderne – anticipe ŝi starigas ĉe tio la demandon, kiamaniere la homoj perceptas tian vizion?*)

Petro diris al Maria: Fratino, ni scias, ke la Savinto amis vin pli ol la ceterajn virinojn. Rakontu do al ni, kion vi memoras el la paroloj de la Savinto, la paroloj, kiujn scias vi kaj kiujn ni ne scias kaj kiujn ni ankaŭ ne aŭdis.

Maria respondis: Mi konigos al vi, kio restis por vi kaŝita. Kaj ŝi ekrakontis, kiel sekvas: Mi – ŝi diris – mi vidis en vizio la Sinjoron, kaj mi diris al li: Sinjoro, hodiaŭ en vizio mi vidas vin. Li respondis al mi: Vi estas feliĉa, ke vi ne ŝanceliĝas vidante min; ĉar kie estas la prudento, tie estas la trezoro. Mi diris al li: Sinjoro (diru al mi) nun: tiu, kiu vidas vizion, ĉi tiu vidas per la spirito aŭ per la animo? La Savinto respondis: Tiu nek per la animo nek per la spirito ĝin vidas, sed per la prudento, kiu estas meze de ambaŭ, li vidas la vizion kaj tio […]

*(Tie ĉi estas lakuno ege longa; pli-malpli same longa kiel la teksto mem ĝis nun.*

*En ĝi, Maria i.a. rakontas la unuan parton de la vizio. La vizio estas legebla kiel Vojaĝo al la ĉielo, fare de la homa animo, rekte tra ĉiuspecaj malhelpantaj baroj. Ĝi estas suprenirado de l' animo postmorte ĝis fine ĝi ekhavos trankvilon: por tio ĝi unue devos venki la barojn de kvar 'potencoj': mallumo, deziro, nescio kaj sepobla kolero.*

*La feminisma teologino Maria de Groot [NL] proponas, ke oni legu la vizion kiel bildigon de psika baraktado por akiri trankvilon kaj ekvilibron: baraktado kiun konas eble ĉiu homo proprasperte. Tiun ĉi specon de gnostikaj 'mitoj' oni povas legi – ŝi diras – kiel psikologiajn analizojn aŭ terapiojn 'avant la lettre' (en epoko kiam ne jam ekzistis tia termino.)*

*La Vojaĝo al la ĉielo certasence estas stereotipa; same la simbolaj 'potencoj', kiujn survoje oni devas venki. – Ankaŭ en la persona evoluovojo, la homoj ofte renkontas kvazaŭ stadiojn iom similajn: precipe ĉe la virinoj kiuj aliĝas feminisman movadon, ofte 'sepobla kolero' montriĝas nemalhavebla stimulo por ekkonsciiĝi pri sia – subpremata – situacio, almenaŭ laŭ Maria de Groot.*)

[…] kaj la Deziro diris: Mi ne vidis vin malsupreniranta, sed nun mi vidas vin supreniranta. Kial vi mensogas [al mi], dum vi apartenas al mi? La animo respondis: Mi vidis vin, sed vi ne vidis min kaj ne rekonis min. Mi estis kvazaŭ vestaĵo por vi, sed vi ne konis min.

Tion ĉi dirinte, kun multe da gajeco ŝi foriris.

Tiam ŝi atingis la trian potencon, kiu nomiĝis Nescio. Tiu demandis la ani-

mon: Kien vi iras? Vi estas malice perfortita sed […] Ne juĝu.

Kaj la animo diris: Kial vi juĝas pri mi, dum mi ne juĝas? Mi estas uzurpita, kvankam mi mem ne uzurpis. Mi ne estis rekonita. Tamen mi komprenis, ke la Ĉiomo solviĝos, kaj la terana kaj la ĉielana.

Post kiam la animo pasis la trian potencon, ŝi plu iris supren kaj ekvidis la kvaran potencon. Tiu posedis sep figurojn. La unua estas mallumo, la dua dezirego, la tria senscio, la kvara estas mortiga envio, la kvina la regado de la karno, la sesa estas la stulteco de karna saĝeco, la sepa estas kolerega saĝo. Tio estas la sep (potencoj) de la kolero.



Maria Magdalena, *Noli me tangere*, [Ne tuŝu min], fresko de Fra Angelico laŭ Joh 20:14-17

Kiam ili demandis la animon: Kio estas via origino, murdintino? kaj Kien vi estas survoje, vi malakceptanta loĝejojn?, la animo respondis: Kiu min ekkaptas, estas mortigita, kaj kiu min ĉirkaŭas, estas flankenmetita. Mia deziro ĉesis kaj la nescio mortis. Mi estas liberigita el unu mondo en (alian) mondon kaj el la ĉiela ekzemplo en (alian) ekzemplon. (Mi estas liberigita) el la ĉenoj de mallonga forgeso. De ĉi momento, mi silente eniros la kvieton, ekster la tempo, la momento, kaj la daŭro.

*(Kaj meze de ĉi lasta frazo komenciĝas la Greklingva fragmento, kiun jam en 1896 oni estis trovinta.)*

Tion ĉi dirinte, Maria silentiĝis, ĉar ĝis tiam parolis al ŝi la Savinto.

Sed Andreas ekparolis al la fratoj: Kion vi opinias pri ĉi diraĵoj? Ĉar mi ja ne kredas, ke la Savinto tion diris: ĉar ĝi ja estas klare deviaj ideoj.

Petro ekparolis kaj parolis jene: li demandis pri la Savinto: Ĉu li do, preterante nin, kaŝe, parolis al virino? Ĉu ni do turniĝu kaj ĉiuj ekaŭdu ŝin? Li ja ne volis montri ŝin pli valora ol ni?! …

Tiam Maria, plorante, diris al Petro: Petro, mia frato, kion vi ekpensas? Ĉu vi kredas, ke tion ĉi mi imagas en mia koro, aŭ ke mi mesogas pri la Savinto?

Levi ekparolis kaj diris al Petro: Petro, ĉiam koleriĝemo vin jam ĉeestas; nun mi vidas, ke vi diskutas kun ĉi virino, kvazaŭ kun kontraŭuloj. Se la Savinto ŝin opiniis digna, kiu do estas vi por ŝin malŝati? Estas certe, ke la Savinto ŝin tre bone konis kaj ke tial li ekamis ŝin pli ol nin. Prefere ni hontu! Ni vestu nin per la perfekta Homo kaj <ni plenumu> nian taskon, ni prediku la evangelion, neniom limigante nek leĝofarante, krom laŭ kion diris la Savinto.

Tiam Levi […] kaj ili foriris por prediki la evangelion.

*(Post tio ĉi mi refoje donis la eblon por serioza legado dum iom da tempo; poste ni interparolis pri la teksto. Pluraj ĉeestantinoj fakte rekonis iel la 'Vojaĝo-temon' en sia persona vivovojo. Spirita kreskado ja similas foje baraktadon por superi barojn. Kaj obstakloj por vera spirita kresko foje estas deziro je io / iu, se ĝi onin obsedas; foje estas nescio-kien-direktiĝi tia obstaklo; kolero foje povas esti instiga, stimula por ekhavi forton, mem elekti sian vojon, kiel pluraj spertis, sed kolero ankaŭ povas kvazaŭ lamigi ĉiun eblon je evoluo. La tago ne sufiĉis en nia grupo por plene trakti la tekston tutdetale. Post tio ni disiris hejmen.)*

La enkonduko kaj la evangelio de Maria [Magdalena] troviĝas ankaŭ ĉe Fontoj.net



## Por la kristana komunumo

Ni ne estas homoj de timo:
Ni estas homoj de kuraĝo.
Ni ne estas homoj, kiuj protektas la propran sekurecon,
sed homoj, kiuj protektas tion de niaj proksimuloj.
Ni ne estas homoj de avareco:
Ni estas homoj de donacemo.
Dio, ni estas viaj,
donante kaj amante,
ĉie ajn ni estas,
kiom ajn ĝi kostas,
tiom longe, kiom bezonatas,
kien ajn vi nin vokas. **Amen**

Tradukis Jack Warren
Kun la permeso de la
Anglikana Eklezio en Britio
Fonto: churchofengland.org

# Kial ni afrikanoj fidas al Dio ?

Charline Buhendwa Tumusifu, DR Kongo

Ni afrikanoj havas fidon al Dio, ĉar ni scias, ke estas li, kiu estas nia kreinto, ni konfidas al li malgraŭ nia sufero, malgraŭ tio, ke la vivo estas mizera, ĉar ni scias, ke ni manĝas per graco, ni vekiĝas per graco, ni vivas, estas per graco, ĉar sen li ni povas fari nenion, kaj sen li ni estas nenio. Li donas al ni la povon labori, estas li, kiu donas al ni ĉion, ĉar ĉio estas graco. Tial ni iras al preĝejo por danki lin kaj preĝi, kaj ni adoras lin, ĉar li estas la ĉiopova de ĉiuj. Ĉiutage ni iras al preĝejo. Antaŭ ol foriri al niaj okupoj, antaŭ ol foriri al lernejo, antaŭ ol iri al la merkato, ni gloras lin pro ĉi tiu graco.

Sed vi eŭropanoj, vi havas ĉion por manĝi, trinki kaj vivi bone, sed multaj el vi ignoras, ke Dio estas via Kreinto. Vi maltrafas la tempon iri al preĝejo pro via laboro kaj okupo. Se la tutan semajnon vi estas okupita, ĉu doni nur al Dio unu tagon dimanĉe estas problemo?

Malgraŭ la laboro de la semajno, donu nur al Dio unu tagon, kaj Dio benos vin, Dio estos feliĉa por ĉiam. Vi devas submetiĝi al Dio. Vi devas doni vin al Dio, vi devas glori lin pro la graco, kiun li donas al vi de tempo al tempo. Vi devas vidi aŭ imagi kiom da homoj mortis, kaj kiom da homoj estas grave malsanaj en la hospitalo, sed vi vivas kaj ankoraŭ sanas, vi ne estas pli inteligenta kaj pli meritplena ol tiu, kiu mortis aŭ estas enhospitaligita, sed Dio donis al vi gracon.

Mi citos 5 bonajn kialojn fidi Dion por sukcesi en la vivo.

Al kiu vi fidas por sukcesi en via vivo? Ĉu al viaj gepatroj, al viaj instruistoj, al viaj gvidantoj, al via edzo aŭ edzino, al vi mem, aŭ al Dio? Post la adoleska aĝo, la deziro doni bonajn fruktojn aŭ sukcesi en la vivo komencas sentiĝi en ĉiu homo. Ĉi tio estas tute normale kaj estas laŭplana paŝo en la dia plano. Nur la reguloj kaj vortoj de ĉi tiu mondo plej ofte puŝas nin fidi je leĝoj kaj referencoj, kiuj estas tre malproksimaj de diaj principoj, por sukcesi en nia vivo. Nun estas skribite:

*Fidu la Eternulon per via tuta koro, Kaj ne fidu vian prudenton.* Sentencoj 3:5

Fidi Dion do estas dia ordono, kiu signifas apogi sin al Dio, krii al Dio, alkroĉiĝi al Dio, serĉi Dion.

En ĉi tiu versiklo (supre), la vorto petas nin ne fidi al alia saĝo krom tiu de Dio, ĉar ĉi tio estas la garantio, ke ni devas sukcesi en ĉiuj niaj projektoj. Dio scias ĉiajn aferojn pli bone ol ni, kaj li sola povas doni al ni tion, kion la mondo ne povas. Se ni volas venki kaj vivi plenumitan vivon, ni devas antaŭeniri ne fidante nin mem, sed kun la certeco, ke Dio ebligas al ni venki.

Por ĉi tio, ni devas fidi Dion ĉiutage

kaj ĉiun horon de la tago por sukcesi en ĉio, kion ni faras.

*Ke al la Eternulo estu via fido, tion mi instruis al vi hodiaŭ.* Sentencoj 22:19

1– Dio konas nian destinon pli bone ol ni

*Ĉar Mi scias la intencojn, kiujn Mi havas koncerne vin, diras la Eternulo, intencojn al bono kaj ne al malbono, por doni al vi estontecon kaj esperon.* Jeremia 29:11

Kiu pli bona ol Dio scias la vojon antaŭen en nia vivo por sukcesi? Li estas la sola, kiu scias precize kion fari kaj kiam, ĉar li estas tiu, kiu kreis nin.

*Antaŭ ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaŭ ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis, Mi faris vin profeto por la popoloj.* Jeremia 1:5

Li scias precize, kion ni estas vokitaj fari, li scias kial ni estis kreitaj kaj li scias la manieron sukcesi. Li scias ĉion ĉi, ĉar li estas tiu, kiu metis ĉiajn donacojn kaj talentojn en nin. Li kreis nin por servi laŭde al sia gloro.

Li estas la arkitekto de nia vivo. Kaj kiu pli bona ol la arkitekto de nia sorto por ebligi nin sukcesi en niaj vivoj?

Efektive, kiel tia, li estas tiu, kiu havas en sia posedo la planojn de nia sorto. Ni do povas fidi lin, ke li gvidos nin al sukceso.

2– Dio volas vidi nin sukcesi: Tio estas promeso de Dio

*Amato, mi preĝas, ke al vi prosperu ĉio, kaj vi bonsanu tiel same, kiel prosperas al via animo*. 3 Johano 1:2

Sukceso estas promeso de Dio. Nia bonstato (spirita kaj materia) estas deziro de Dio. Li estas nia patro kaj kiel tia li deziras vidi nin sukcesi.

La Biblio diras, ke ni estis kreitaj por laŭdi lian gloron. Ĉi tio signifas, ke nia sukceso, nia bona sano, nia prospero unue gloras Dion kaj poste honoras nin.

Ni do povas fidi lin, ke li gvidos nin al sukceso, ĉar tio estas lia deziro. Sukceso, nia sukceso direktiĝas al Dio, kaj malsukceso kontraŭas lian volon.

Tial estas klare, ke li faros ĉion por gvidi nin kaj levi nin, se ni iros laŭ lia vorto kaj se ni fidos al li.

3– Dio estas fidela por gvidi kaj beni nin

Ni havas pli ol fidelan Dion, li ne mensogas kaj faras tion, kion li promesis.

*Dio ne estas homo, ke Li mensogus, kaj ne homido, ke Li pentus. Ĉu Li dirus kaj ne farus, parolus kaj ne plenumus?* Nombroj 23:19

Li metis donacon en ĉiun el ni; ni ĉiuj havas promeson de Dio pri nia vivo. Kaj ĉar li promesis al ni per sia vorto, per revelacio, en sonĝoj kaj vizioj, aŭ per profetaĵo, li certigos, ke ĝi plenumiĝos.

*Kaj la Eternulo diris al mi: Vi vidis bone; ĉar Mi maldormos pri Mia vorto, por plenumi ĝin*. Jeremia 1:12

Li scias la vojon kaj la rimedojn por atingi nian celon. Se ni marŝos laŭ lia promeso, se ni fidos, ke li gvidos niajn paŝojn, li mem certigos plenumi ĉi tiun promeson en nia vivo, ĉar li ne elverŝas siajn donacojn.

4– Li kapabligas nin kaj ekipas nin

Ni devas fidi, ke Dio sukcesos en niaj vivoj, ĉar Li estas tiu, kiu ebligas al ni plenumi grandajn aferojn en niaj vivoj.

Efektive, se ni konfidos al li la kondukilojn de nia vivo, li metos en nin la ĝustan mezuron de fido, la ĝustan mezuron, la saĝon, la ĝustan mezuron de kuraĝo kaj scio, por ke ni povu fari eksterordinarajn aferojn kvankam estante ordinaraj homoj.

*Kaj aperis al li la anĝelo de la Eternulo, kaj diris al li: La Eternulo estas kun vi, brava heroo!* Juĝistoj 6:12

Gideon ankaŭ ne sciis, ke Dio metis en lin dozon de fido kaj kuraĝo por iĝi kuraĝa heroo kaj liberigi la popolon de Dio. Sed ĉar Dio ekipas nin, Gideon malkovris, kion li kapablas obeante kaj fidante Dion.

Ni do ne timu, ĉar li metis en nin la necesajn armilojn por sukcesi en ĉiuj niaj projektoj kaj akiri niajn venkojn.

*Kaj la Sinjoro diris per vizio nokte al Paŭlo: Ne timu, sed parolu, kaj ne silentu*. Agoj 18:9

5– Li batalos por ni antaŭ obstakloj

Unu el la aferoj, kiuj plej ofte retenas nin de sukcesa vivo kiel infano de Dio, estas la obstakloj, kiuj staras antaŭ ni, tuj kiam ni decidas marŝi kun Dio kaj fari grandajn kaj belajn aferojn en nia propra vivo.

Sed tiurilate ni devas esti certaj, ke Dio batalos por ni kiam ajn la diablo leviĝos por konduki nin al malsukceso. Cetere, laŭ la vorto de Dio, ni jam venkas eĉ antaŭ ol la diablo kaj la obstakloj staras antaŭ ni.

Dio estas fidela

Fido al Dio produktas vivon kaj neglekto de Dio produktas morton

Ke Dio benu vin

## Mi estas ...



Mia nomo estas Charline Buhendwa Tumusifu. Mi naskiĝis la 4an de januaro 1996. Mi loĝas en Demokrata Respubliko de Kongo, en la provinco de suda Kivuo, en la urbo Bukavu. Mi estas la plej aĝa filino en nia familio kaj mi estas unu inter 10 infanoj. Nia patro nin forlasis antaŭ tre longa tempo, ni loĝas kun nia patrino, mi estas flegistina studento.

Ĉi tie hejme estas multaj masakroj, seksa kaj ankaŭ mensa perforto, ĉiutaga malsekureco, estas multe da memmortigoj, homoj mortas pro manko de manĝaĵoj, aliaj estas nekapablaj eduki siajn infanojn pro manko de rimedoj, estas multaj orfaj infanoj, al kiuj eĉ mankas la hejmo, ili fariĝis la strataj infanoj.

*Charline Buhendwa Tumusifu*
charlinetumusifu@gmail.com

# Modernaj komunikiloj — ŝanco por nia KELI

Wolfram ROHLOFF, DE

La germana sekcio de KELI ĉijare planis okazigi la Bibliajn Tagojn inter la 25a kaj 29a de marto en la historie riĉa urbo Worms en okcidenta Germanio apud la riverego Rejno/Rhein. Mi antaŭĝojis al la renkontiĝo kaj preparis la teman programon: Ni volis diskuti pri la tri leteroj de Johano (kaj la evangelio laŭ Johano). Aliĝis el pluraj eŭropaj landoj esperantistoj, kaj se mi ĝuste memoras, la de ni antaŭmenditaj lokoj en la junulargastejo estus ĉiuj okupitaj — se la Bibliaj Tagoj 2020 estus okazintaj. Sed bedaŭrinde ankaŭ ni, same kiel multaj aliaj organisaĵoj, devis nuligi la kunvenon pro la disvastiĝanta koron-virusa malsano. Dolora, sed ĝusta decido, mi opinias.

Tiam naskiĝis la ideo, tamen iel kunveni per la helpo de modernaj komunikiloj: Ni sciis, ke multaj aliĝintoj havas poŝtelefon. Kaj multaj el ili uzas la poŝtelefonan aplikaĵon WHATSAPP, per kiu ebligas skriban, voĉan, filman aŭ vidtelefonanan komunikadon, ĉu kun unu persono, ĉu kun multaj samtempe en tiel nomata WHATSAPP-Grupo. Mi "fondis" je la 26a de marto WhatsApp-an grupon kaj Stefan Lepping, kunorganizanto de la Bibliaj Tagoj, la sekvan matenon aligis al tiu ĉi grupo ĉiujn konatajn mobiltelefonajn numerojn de aliĝintoj kaj malfermis la Bibliajn Tagojn per dissendita filmo, en kiu li por ni kantas kaj piane ludas la kanton 115 el ADORU: *Vekiĝu, kor', kun kanto*. Sekvis je la 12a horo kaj 2 minutoj ;-) la de Stefan kantata *Tagmeza Ĥoro*, bela diserveto el monaĥeja tradicio (ADORU numeroj 011 ĝis 012) por kunpreĝado.

Dum la tagoj sekvis ekzemple la rozario, diversaj kantoj, bildoj, preĝoj kaj prelegoj pri la tri Leteroj de Johano. Mi jam antaŭe uzadis la aplikaĵon WHATSAPP, sed tamen devis lerni pli lertan uzadon por la Bibliaj Tagoj. Ekzemple mi nur nun eksciis, ke filmoj ne estu pli longaj ol ĉirkaŭ 6 minutoj, por ke mi povu ilin dissendi en la grupo. Tial mi dividis la prelegojn en pli malgrandajn erojn.

Dimanĉe, je la oficiala fino de la Bibliaj Tagoj ni invitis al ekumena diservo en Esperanto el mia Zeblica preĝejo. Tiun longan filmon mi ne povis dissendi per la poŝtelefona aplikaĵo, sed publikigis ĝin rete per YouTube [jutubo]. (Cetere la filmaj kontribuoj ĝis hodiaŭ restas rigardeblaj, se Vi vizitas la hejmpaĝon de mia paroĥo *www.kirche-in-zoeblitz.de* kaj tie klakas al la butono "Die Predigten … zum Nachhören..." / [La predikoj … por posta aŭskultado...].

Per tiu unua diservo komenciĝis la Internaciaj Retaj Diservoj en Esperanto (IRDE). Por la preparado de tiuj diservoj tre gravis, krom la helpo de multaj esperantoparolantoj el diversaj landoj,

eĉ kontinentoj, unu persono: Olaf Uhlmann, volontula teknikisto el mia paroĥo, kiu nek parolas esperanton nek ricevis monon por sia laboro, sed tamen volonte muntis, teknike prilaboris, preparis kaj enretigis la filmojn.

Mi esperas, ke KELI en estonteco regule povos daŭrigi Internaciajn Retajn Diservojn en Esperanto. Por tiu celo necesas kunlaborantoj, kiuj ekzemple invitos la IRDE-on al sia loko, tie filmas ĉefajn erojn (ekzemple kantojn, legaĵojn, muzikon, predikon …) kaj petos aliajn filmi aliloke aliajn kontribuojn. Olaf Uhlmann pretas kombini el tiuj eroj, kun mia helpo, novajn retajn diservojn. Se vi volas helpi, skribu al mia retpoŝta adreso: *keli.prezidanto@web.de*

Ĉu en la jaro 2021 okazos Bibliaj Tagoj? Ni almenaŭ antaŭmendis junulargastejon en Trier kaj esperas, ke tie ni renkontiĝos inter la 24a kaj 28a de februaro 2021. Ni havas temon, biblian libron: La Agoj de la Apostoloj. Tiun ni ankaŭ volas rigardi el virina perspektivo. Sed en decembro la germana sekcio de KELI devos, laŭ la kontrakto kun la junulargastejo, decidi pri okazigo aŭ nuligo. Mi timas, ke la pandemia situacio en decembro kaj eĉ pli en februaro ne estos alia ol nun. Tiukaze ni ne povos kunveni en la reala mondo kaj devos denove nuligi la aranĝon.

Mi tre bedaŭrus, se la Bibliaj Tagoj denove ne okazus. Mi sopiras renkonti kaj babili kun konatojn kaj ankoraŭ-ne-konatojn. Kion ni faru?

Kial ne kunveni en la virtuala mondo? Naskiĝis nova ideo: Ekzistas diversaj programoj, kiuj ebligas vid-telefonajn konferencojn. Sufiĉe konata estas la usona Skype [Skajpo] kaj ankaŭ Zoom.

Dum la Reformacio Tago ni dissendis, denove per YouTube, Biblian lecionon pri Mateo 15, 21 ĝis 28. Okaze de tiu leciono mi demandis la spektantojn, ĉu ili havas intereson pri reta diskutrondo pri la Biblio kaj petis la interesatojn skribi al mi retmesaĝon.

Kelkaj tion faris kaj tial mi la pasintan sabaton, do je la 14a de novembro 2020 prove invitis je la 22a horo laŭ mezeŭropa tempo al reta diskutrondo pri la Biblio. Ni estis ses partoprenantoj: 2 italoj, 2 usonanoj kaj 2 germanoj. Tiu prova kunveno kaj la diskuto pri Marko 14, versikloj 1–11 plaĉis al ni ĉiuj. Tial ni ses decidis, daŭrigi la kunvenon dum la venontaj semajnoj. Mi intencis eble nur ĉiun duan monaton, sed, almenaŭ komence, ĉiusemajne sabate je la 22a horo.

Ni uzas la liberan programon Jitsi Meet. Mi decidis uzi tiun, ĉar ĝi estas kaj senkosta kaj kongruas al la datumprotektaj leĝoj en la Eŭropa Unio. Eĉ ne necesas registriĝo, se Vi volas partopreni. Vi nur bezonas aŭ “saĝ”-telefonon aŭ komputilon kun mikrofono kaj kamerao kaj aliro al la interreto. Tamen mi rekomendas al Vi antaŭe prove ekzerci la funkciadon de la programo per vizito de la sekva retpaĝo: https://meet.jit.si/ kaj ankaŭ spekti ĉe YouTube informajn filmojn pri la programo Jitsi Meet en Via lingvo.

Por la eniro al la Diskutrondo Vi entajpu tie la nomon *Biblia Diskutrondo Zeblica* aŭ uzu la rektan ligilon:
*https://meet.jit.si/BibliaDiskutrondoZeblica*

La grupo *Biblia Diskutrondo Zeblica* estas malferma al ĉiuj esperantistoj. Tamen mi ĝojus, se Vi antaŭe informus min per retmesaĝo pri Via partopreno, ĉar tiel mi povus sendi al Vi kaj la aktualan, eble ŝanĝitan tempon, kaj la biblian tekston kaj la ligilon. (Mi jam rimarkis, ke la aliro kelkfoje ne tuj funkcias, se oni mem entajpas la nomon *Biblia Diskutrondo Zeblica* sur la hejmpaĝon de Jitsi Meet. Tial estas pli oportune, klaki al la ligilo, de mi dissendata, por eniri la grupon.)

Sed nun mi kore salutas Vin kaj esperas al persona renkontiĝo kun kelkaj el Vi, ĉu dum realaj Bibliaj Tagoj en Trier ĉu dum iu reta kunveno de KELI, ekzemple dum la Biblia Diskutrondo Zeblica.

Mi kore salutas Vin,
Via ***Wolfram Rohloff***
prezidanto de la Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo, la germana KELI-sekcio

P.S. KELI havas (nuntempe ne ĉiam aktualan) retpaĝon http://keli.chez.com/. Tre bela estas la retpaĝo de la *Ekumena Kongreso 2021*, kiu okazos de la 7a ĝis 14a de aŭgusto en Pollando. Indas viziti tiun ĉi retpaĝon kaj eksopiri partoprenon: *https://keli.sea-vroc.eŭ/*

P.S.2 Mi rekomendas al Vi aliĝon al la retpoŝta *Diskut-Listo Dia Regno*, kiu estis ĉe yahoo kaj nun translokiĝos al Google.

# Klimato : Ĉu estas sane nenion fari?

Martin Kopp, FR

La Nobel-premio pri paco. Ni povas veti, ke en 2007 iuj inter la Registara Panelo pri Klimata Ŝanĝo (IPCC/GIEC)[1] surpriziĝis esti gajnantoj[2]. Ili ne estis la nuraj. Multaj tiam malkovris, ke la klimataj ŝanĝiĝoj apartenas al la fundamentaj sociaj problemoj, kiel la internacia sekureco. Kvin jarojn post la ekvalidiĝo de la Pariza Interkonsento, ni revenu al unu el ĉi tiuj problemoj: sano.

Nia atmosfero, maldika blua tavolo sur la surfaco de nia planedo Tero, jam varmiĝis mezume je 1,1 °C kaj la ŝtataj devontigoj kondukas al pliiĝo de 3 °C aŭ pli. Ĉi tiu trajektorio endanĝerigas la ekosistemajn varojn kaj servojn necesajn por la vivo: pli malabunda trinkakvo; nutraĵa malsekureco; kune altaj varmo kaj humideco; pli oftaj kaj/aŭ pli intensaj ekstremaj veteraj eventoj; pliigita perdo de biodiverseco, ktp.

Loĝantaroj reagos diversmaniere. Multaj estos devigataj migri — laŭ UN, ĝis 250 milionoj da homoj ĝis 2050. Aliaj startos sociajn kaj eĉ internaciajn

armitajn konfliktojn; klimata ŝanĝo ja povas plifortigi konatajn kaŭzojn de konflikto aŭ kontribui al eksploda "koktela efiko". Ni krome scias, ke la ekonomiaj kostoj de ĉiuj ĉi evoluoj estos altaj.

Legante ĉi tiun mallongan super-rigardon, ni komprenas, ke la sano de loĝantaro estas en danĝero. Laŭ la MSO[2], ĝiaj sociaj kaj mediaj determinantoj konsiderindas: aerkvalito, rimarkante ekzemple, ke la koncentriĝo de ozono kaj aliaj malpurigaĵoj pliiĝas kun la temperaturo; havebleco de sekura dolĉa akvo, kompromitante higienon kaj pliigante la riskon de diareaj malsanoj; provizado de nutraĵoj, ekzemple pormanĝa produktado trafita de ofta sekeco, kies nombro probable duobliĝos kaj kies meza daŭro sesobliĝos; loĝsekureco — sufiĉas memori, ke duono de la homaro loĝas malpli ol 60 km proksime de la maro. Krome ekstremaj veteraj eventoj kiel inundoj aŭ tajfunoj, kiuj triobliĝis ekde 1960, mortigas, vundas, kaŭzas traŭmatismojn kaj detruas la fleg- kaj san-ekipaĵojn.

Gravas rimarki, ke ĉi tiuj efikoj estas malegale distribuitaj, la landoj situantaj ĉirkaŭ la ekvatora zono — tial ĝenerale evoluantaj — estas la plej vundeblaj. Tamen la superforta plimulto el ili havas malmultan aŭ kvazaŭ nulan historian respondecon, ellasinte tre malmulte da forcej-efikaj gasoj. Klimataj ŝanĝiĝoj do starigas seriozan demandon pri justeco.

Ni povas kompreni, kiel diras Isabelle Autissier[4]: "Neniu sana homo sur malsana planedo". Konsciiĝi pri la minaco estas ankaŭ konsciiĝi pri la oportuno. Agi por mildigi la klimatajn ŝanĝiĝojn kaj adaptiĝi al ili signifas labori por pli sanaj nuno kaj estonto, por socioj kun daŭripova ekologia spuro, por pli justa kaj paciĝinta mondo. Jen io inda por engaĝiĝi!

Martin Kopp[5], protestanta ekologia teologo

Fintraduko Philippe Cousson el la franca de artikolo verkita por *Dia Regno*

ꙮ

[1] GIEC, *Changements climatiques 2014. Incidences, adaptation et vulnérabilité. Résumé à l'intention des décideurs*, Genève, GIEC, 2014. (Klimataj ŝanĝiĝoj 2014. Efikoj, adaptado kaj vundebleco. Resumo por la decidantoj)

[2] La Nobelpremio por paco 2007: La Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo (IPCC) kaj Al Gore

[3] OMS [fr, =WHO an, =MSO eo], « Changement climatique et santé » [rete], 1an de februaro 2018. URL : https://tinyurl.com/unym54y Konsultita la 1an de novembro 2020. (Klimata ŝanĝiĝo kaj sano)

[4] https://fr.wikipedia.org/wiki/Isabelle_Autissier

[5] https://www.reformes.ch/portraits/2019/04/martin-kopp-lenthousiaste-reformes-mai-2019-portraits-ecologie-climat

# Ni ne forgesu ...

## Rememoro pro la Kristala nokto

Kompilis Bengt Olof Åradsson, SE

En novembro pasintjare mi ĉeestis rememorigan okazaĵon pro la Kristala nokto, kiu ankaŭ nomiĝas la novembra pogromo okazinta en Germanio kaj Aŭstrio en novembro 1938. La novembra pogromo estis laŭ multaj manieroj la preludo al la holokaŭsto, kie ses milionoj da judoj estis mortigitaj en gasĉambroj, pro malsato aŭ pro aliaj malfacilaĵoj.

Pro la korona-pandemio, ĉi-jare la manifestacio ne okazis. Sed tiuj krimoj neniam devas esti forgesitaj kaj la antisemitismo, kiun ni alfrontas hodiaŭ en la mondo, en Eŭropo en niaj propraj landoj, devas esti kontraŭbatalita ĉiel-maniere.

El Vikipedio:

*Kristallnacht*, ***La Nokto de Rompita Vitro*** aŭ en spegultraduko *kristala nokto*, estis pogromo kontraŭ la judaj civitanoj dum la nokto de la 9a de novembro ĝis la 10a de novembro, 1938.

Je la 7-a de novembro, 1938, Ernst vom Rath, sekretario de Germana Ambasadejo en Parizo, estis mortpafita de Herschel Grynszpan, juda germano kiu fuĝis el Germanio al Francio. La nazioj uzis tion kiel pretekston por lanĉi pogromon kontraŭ la juda loĝantaro tra la lando.

Kvankam la kampanjo devus esti spontana partoprenis ĝin batalgrupoj de SA kaj eĉ membroj de SS. Rezulte: oni murdis 91 personojn de juda nacieco; bruligis aŭ detruis plurcent sinagogojn kaj domojn; profanis preskaŭ ĉiujn judajn tombejojn; setligis en koncentrejoj ĉirkaŭ 20–30 mil judojn.

Tamen plimulto de germanoj restis pasiva, nur malmultaj aliĝis al ĉi tiu vandalismo.

La Kristala nokto ekigis novan fazon de kontraŭjudaj agoj de nazia registaro. Antaŭrimedojn por realigi la elmigradon kaj, fine, la ekstermadon de la juda popolo entrepenis la nazioj sen justa proceso.



La interno de la detruita sinagogo dum la Kristala nokto en Pforzheim

# Iom gramatike

## El PMEG — Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

### Sekcio 8.2.4. Nombro – specialaj okazoj

https://bertilow.com/pmeg/index.html

La kunliga vorteto **aŭ** normale montras ekskluzivan sencon (devas esti nur unu el la alternativoj), sed iafoje ĝi estas inkluziva (povas validi pluraj alternativoj samtempe). Kiam pluraj aferoj estas ligitaj per *aŭ*, la uzo de J-finaĵo dependas de la senco:

- *Karlo aŭ Petro estas* ***kulpa***. Nur unu estas kulpa.
- *Aŭ la angloj aŭ la francoj estos* ***unuaj*** *sur la scenejo*. Nur unu el la alternativoj povas validi, sed ĉiu el ili estas per si mem multe-nombra.
- *Aŭ mi aŭ miaj kontraŭuloj estas* ***prava(j)***. Ĉi tie nek gramatika logiko, nek la senco povas solvi la konflikton inter unu-nombro kaj multe-nombro. Oni elektu laŭplaĉe. Verŝajne plej multaj elektus *pravaj* pro la proksimeco al la vorto *kontraŭuloj*. Plej bone estas verŝajne revortigi la frazon por eviti la problemon: *Aŭ mi estas* ***prava****, aŭ miaj kontraŭuloj (estas* ***pravaj****)*. En tiu ĉi okazo la plej simpla solvo estas: *Aŭ mi aŭ miaj kontraŭuloj* ***pravas***.

Iafoje oni povas aŭ rigardi ĉiujn membrojn de grupo kune, aŭ rigardi ĉiun individuon aparte:

- *Unu velo post la alia estis* ***levataj***. Zamenhof pensis pri ĉiuj veloj kune, sed se oni pensas pri ĉiu aparta levo de velo, oni povas forlasi la finaĵon J, sed tiam oni ankaŭ **ŝanĝu** *levataj* al *levita*.

Iafoje du (aŭ pluraj) unu-nombraj esprimoj montras la saman aferon. Malgraŭ ŝajna plureco, temas pri nur unu:

- *Gaston Waringhien, ĉefaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro, kaj kunaŭtoro de Plena Analiza Gramatiko, estas prave* ***rigardata*** *kiel unu el la majstroj de Esperanto*. Supraĵe povas ŝajni kiel tri homoj, sed estas vere nur unu, kiun oni nomas en tri manieroj. Sekve estu rigardata (ne rigardataj).
- *Tiu ĉi strando, aŭ plaĝo, estas* ***perfekta*** *por niaj bezonoj*. La aldono *aŭ plaĝo* ne priparolas alian lokon, sed la saman per preskaŭ samsignifa vorto.

Iafoje apud unu ĉefa afero aperas alia en flanka komparo, necerteca aldono, aŭ simile. Tiam oni konsideru normale nur la ĉefan esprimon. Pri tiaj frazoj tamen ne ekzistas firmaj reguloj, ĉio dependas de la senco:

- *La instruistino, same kiel ŝiaj lernantoj, estis post kvartaga intensa instruado tre* ***laca***. Laca estu normale unu-nombra, ĉar ĝi priskribas ĉefe la instruiston, sed ne estus eraro diri lacaj, se oni volas klare inkluzivigi ankaŭ la lernantojn.
- *Elizabeto,* ***kaj eble ankaŭ ŝia edzo****, estos verŝajne* ***invitita(j)***. Oni diru invitita aŭ invititaj depende de la verŝajneco, ke ankaŭ la edzo estos invitita.
- *Sofio, sed ne ŝia fratino, estas* ***bonvena*** *al la festo*. Ĉi tie bonvena laŭsence ne priskribas la fratinon, kaj estus do erare diri bonvenaj.

# Informetoj

## Retaj ligiloj

Nun, dum la pandemio ni ne havas la samajn eblecojn partopreni kunvenojn kaj kongresojn, sed la reto donas al ni multajn eblecojn trovi legaĵojn k.t.p. Jen kelkaj ligiloj, kiuj povas esti utilaj por trovi legaĵojn kaj aliajn interesaĵojn. La listo unue aperis en la sveda gazeto La Espero /Red

| | |
|---|---|
| http://vimeo.com/uea/videos | Ĉi-tie vi povos spekti kaj aŭskulti prelegojn faritaj dum i a Malfermaj Tagoj en Centra Oficejo de UEA. |
| https://tinyurl.com/y4o9wy5d | Jen ĉiu-monataj radioprogramoj el Erfurt, Germanio, en la germana kaj esperanto. |
| http://novajhoj.weebly.com/index.html | TREege utila retpaĝaro kun novaĵoj de diversaj mondopartoj kaj ligoj al multnombraj aliaj diverstemaj retpaĝoj. |
| http://esperantoilustrita.blogspot.com.br | Virtuala revuo en formo de blogo (el Brazilo). |
| http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php | Senpagaj elektronikaj libroj. |
| http://www.facebook.com/EKOKULTURA | Multaj interesaj bildoj kaj informoj. |
| http://esperantaretradio.blogspot.co.at/ | Ĉiutagaj radioelsendoj en klara esperanto, akompanataj de la koncernaj skribitaj tekstoj. |
| http://neniammilitointerni.over-blog.com | Publikigas en esperanto amason da soci-politikaj, ekonomiaj aŭ mediaj informoj |
| http://multedaridoj.blogspot.com.br/ | Bildstrioj |
| http://radio.esperanto-ondo.ru/ | Sonprogramo/podkasto |
| http://i-espero.info/ | Novaĵoj, artikoloj, libroj (elŝuteblaj pdf) |
| verkoj.com. | Verkistoj transdonis verkojn al tiu retpaĝaro |

# Nek la morto, nek la vivo

(el Rom 8,37-39; laŭ Gal 5,19-23; el Rom 13,12-14)




NEK LA MORTO, NEK LA VIVO • M: Albrecht Kronenberger 2019-01-24 • Akordoj: Ernst Leuze 2019-03 26 ĉe mi en Neustadt • E (el Rom 8,37-39; laŭ Gal 5,19-23; el Rom 13,12-14): Albrecht Kronenberger 2019-03-30

2. Evidentas la produktoj de l' pekemo en ni:
   koleregoj kaj ĵaluzoj, malpacem' kaj envi'.
   Sed la frukto de l' Spirito estas amo kaj mildec',
   sinregado, komplezemo, bonkorec', fidelec'.

3. Jen la nokto jam finiĝas, proksimiĝas la tag'.
   Ni demetu do la farojn de mallum', de misag'.
   Ni surmetu la armilojn de la lumo, de l' Sinjor',
   kaj ni sekvu la intencojn de l' Spirit' al la glor'.

4. = 1.